

## La premio pri ekonomiko de la Sveda centra banko

La Sveda centra banko (*Sveriges riksbank*) fondiĝis en 1668 kaj konsideras sin la plej malnova centra banko en la mondo. Lige al sia 300-jara jubileo en 1968, ĝi starigis premion, kiu estas oficiale nomata *Sveriges riksbanks pris i ekonomisk vetenskap till Alfred Nobels minne* (Premio pri ekonomiko de la Sveda centra banko memore al Alfred Nobel). La Reĝa akademio pri sciencoj (*Kungliga vetenskapsakademien*) decidas pri nomumo de laŭreato(j). Ne la Nobel-fonduso sed la Sveda centra banko finansas la premion, kiu estas disdonata lige al la disdono de la Nobelpremioj pri kemio, fiziko, literaturo kaj medicino aŭ fiziologio.

Kvankam la ekonomika premio ne estas menciita en la testamento de Nobel, la akademio klopodas por sekvi ties principojn. Tio i.a. signifas, ke oni premiu specifajn atingaĵojn prefere al elstaraj personoj. (Tio povas esti iom komplika en fako, kiu ne tiom karakteriziĝas per eltrovoj kaj inventoj kiom per iom-post-ioma evoluo.)

Ŝajnas ke estis tendenco, ke la premiitaĵo grade ŝanĝiĝis kun la tempo. En la fruaj jaroj la premiitaj atingaĵoj estis sufiĉe bazaj kaj vastaj, kaj la laŭreatoj estis konataj de ĉiuj ekonomikistoj. Ekzemple en 1969 Ragnar Frisch

kaj Jan Tinbergen estis laŭreatoj pro "evoluiĝo kaj apliko de dinamikaj modeloj", kaj en 1970 Paul Samuelson ricevis la premion ĉar li "evoluis statikan kaj dinaman ekonomikan teorion kaj aktive kontribuis al altigo de la nivelo de analizo en la ekonomika scienco". En la lastaj jaretoj ofte specialaj atingaĵoj en subfakoj estas premiitaj, kiel en 2020 "plibonigo de la teorio de aŭkcioj kaj invento de novaj formoj de aŭkcioj".



En 2021 la premion dividis *David Card* ("pro liaj empiriaj kontribuoj al labormerkatekonomiko") kun *Joshua D Angrist* kaj *Guido W Imbens* ("pro iliaj metodologikaj kontribuoj al la analizo de kaŭzaj rilatoj"). En ambaŭ okazoj temas pri konkludoj el iaj "naturaj eksperimentoj".

En la sociaj sciencoj povas esti malfacile fari konkludon pri la rilato inter kaŭzo kaj efiko. Statistika korelacio ne sufiĉas por konkludi ke estas kaŭza inter-

rilato. Oni malofte povas fari veran eksperimenton sed devas kontentiĝi per datumoj, kiujn influis politikaj decidoj kaj aliaj cirkonstancoj.

Tamen, ofte eblas rigardi la situacion kiel "naturan eksperimenton" kaj pritrakti ĝin tiel, ke ĝi similas al vera eksperimento. Ekzemple, oni studis la rilaton inter studotempo kaj estonta enspezo kaj, nesurprize, sen pluaj konsideroj vidis, ke ju pli da studojaroj des averaĝe pli alta estas la enspezo de individuo.

Sed la studotempo de certa individuo ne estas hazarda. Povus esti tiel, ekzemple, ke tiuj, kiuj decidis studi pli longe estas ĝenerale pli kapablaj kaj tial enspezas pli ol tiuj, kiuj studis malpli da jaroj. Tamen, per pli da certa informo eblis disdividi la individuojn kvazaŭ la disdivido okazus per lotado, kaj poste apartigi la efikon de pli longa studado de la efiko de aliaj kaŭzoj sur la estontan enspezon.

Traktante situaciojn tiel, ke ili pli-malpli egalas verajn eksperimentojn, oni studis i.a. la efikon de leĝo pri minimuma salajro sur senlaborecon, la efikon de enmigrado sur la labormerkaton, la efikojn de ŝanĝoj en impostoj kaj subvencioj, kaj multajn aliajn okazintaĵojn.

*Bo Sandelin*



David Card, USA

Joshua D. Angrist, USA

Guido W. Imbens, USA

<https://www.kva.se/sv/kalendarium/offentliggorand-et-av-sveriges-riksbanks-pris-i-ekonomisk-vetenskap-till-alfred-nobels-minne-2021>